## Ein Besucher beim Präsidenten

Rüdiger Sachs

Der muß verrückt sein, dieser Vogel! Wie ein Geschoß fliegt er, wie schon beim Hineingehen nun auch beim Herauskommen aus unserem Haus, an uns vorbei und sitzt jetzt schimpfend auf dem Hof, erregt mit dem roten Schwänzchen wippend. Als wir zurückkommen und uns der Haustüre nähern – *ssschschschut!"* – im Sturzflug kommt ein Vögelchen aus der Zeitungsröhre unter dem Briefkasten herausgeflogen und schimpft ob der Störung, nun von der Regenrinne des Nachbarhauses. Und da – der Grund der Aufregung: Zweige in der Zeitungsröhre! Ein Vogelnest!!

Wir waren 6 Wochen in Australien. Unseren Briefkastenschlüssel hatten wir dem Nachbarn gegeben. Der bat den Briefträger, die Post direkt zu ihm zu bringen. So blieb Haustür und Briefkasten für die ganze Zeit unberührt von Menschenhand und die Eingangstreppe verschont von Menschenfuß. Mit Besuch während unserer Abwesenheit hatten wir nicht gerechnet – zumindest nicht mit jemandem, der unsere Abwesenheit zur Einquartierung nutzen würde!

Wie viele insektenfressende Vögel verbringt auch das Rotschwänzchen den kalten Winter in wärmeren südlichen Gefilden und kehrt im März/April zurück nach Europa um zu brüten. Sofort beginnt der Nestbau (während das Männchen durch anhaltendes Singen zeigt, wer Herr in dem Revier ist) in alten Gemäuern, hohlen Baumästen, verlassenen Nistkästen vom Vorjahr oder, wie jetzt zu sehen, in einer zwar etwas angerosteten aber intakten Zeitungsröhre des ISAE-Präsidenten.

Die beiden Arten, Garten- und Hausrotschwänzchen, heißen *Phoenicurus phoenicu*... Halt! Dieser Bericht soll keine wissenschaftliche Abhandlung werden! Das überlasse ich den Ornithologen! Hier nur über den Mut (und den Erfolg!) eines Vogelpärchens, das, trotz dauernder Störung durch Menschen am Hauseingang (Bild 1), in geschützter Dunkelheit (Bild 2) einer Zeitungsröhre (Bild 3) tapfer bis zum Schlüpfen der Jungen (Bild 4) „ihr Heim" verteidigte. Die Ehrung des Vogelmutes erfolgt respektvoll, natürlich in Reimen, auf den folgenden zwei Seiten...

Danksagung : Herr *F.-G. Rössler* sah die Fotos – und übersetzte sofort die 4 Strophen von Esperanto ins Deutsche. Ich danke dafür sowie für Textanpassungen und Herausgabe der kleinen Broschüre „Das Nest in einer Zeitungsröhre" (Ed. Antiphon, 2003) mit Titelgraphik von *Rita Rössler-Buckel.*



## Vizitant' ĉe l' prezidant'

*Rüdiger* SACHS


Ĝi vere estas freneza, tiu ĉi birdo! Kvazaŭ pafaĵo ĝi preterrapidegas nin, enirante nian domon same kiel ankaŭ elirante, kaj nun ĝi sidas insultbleke sur la kortgrundo, kun pro ekscito vibranta ruĝa vosteto. Kiam ni, reveninte, proksimiĝas al la dompordo – "*sssssŝŝŝŝut*…!" – la birdeto plonĝfluge elflugas el la gazettubo sub nia leterkesto kaj insulte birdblekas pro la ĝeno, nun de sur la najbardoma pluvforkonduktubo. Kaj jen – evidentiĝas la kaŭzo de la birda ekscito: branĉoj en la gazettubo! Birdonesto!!

Ni estis restintaj 6 semajnojn en Aŭstralio. La poŝtkestan ŝlosilon ni estis donintaj al najbaro, kiu tamen petis la poŝtiston alporti la poŝtaĵon rekte al lia adreso. Tial kaj la dompordo kaj la leterkesto restis la tutan tempon netuŝitaj de homa mano – kaj restis neĝenita de homa piedo la doma enirŝtuparo. Vizitanton dum nia foresto ni certe ne estis atendintaj – almenaŭ ne iun, kiu ekspluatus nian foreston por enloĝiĝo!

Kiel multaj insektomanĝantaj birdoj ankaŭ la ruĝvostuleto restadas dumvintre en pli varmaj regionoj kaj revenas al Eŭropo en marto/aprilo por kovadi. Tuj komenciĝas la nestkonstruado (dum la masklo markas sian "loĝdistrikton" per daŭra kantado) en malnova muraĵo, arbaj branĉkavaĵoj, forlasitaj nestkestoj de la antaŭa jaro aŭ, kiel nun evidentiĝas, ankaŭ en iom rustiĝinta tamen nedifektita gazetotubo de la ISAE-prezidanto.


La du hejmaj ruĝvostulspecioj, la "ĝardena" kaj la "doma", nomiĝas *Phoenicurus phoenicu*… Haltu! Tiu ĉi rakonto ne fariĝu scienca traktato! Tion mi lasu al ornitologoj! Ĉi-loke nur mallonge pri la kuraĝo (kaj sukceso!) de eta birdoparo, kiu, spite de daŭra perhoma ĝeno ĉe domenirejo (Bildo 1), en protekta mallumo (Bildo 2) de gazettubo (Bildo 3), brave defendis ĝis la fina elkovado de la idaro (Bildo 4) "sian hejmon". La omaĝo al la birda heroeco okazos, certe rimoforme, en la sekvaj du paĝoj…

Dankesprimo : S-ro *F.-G. Rössler* vidis la fotojn – kaj tuj elesperantigis la 4 strofojn en la germanan lingvon. Mi dankas pro tio kaj ioma tekstprilaboro kaj eldono de eta broŝuro "La nesto en gazetotubo" (Eldonejo Antifono, 2003) kun titola grafikaĵo de *Rita Rössler-Buckel.*



**Bildo 1** : Du ujoj ĉe la Saksa pordo?
Funkcias laŭ poŝtista ordo!
La supro por leter´ sendube,
gazetojn en la tubon sube.


*Zwei Kästen gleich am Sachs'schen Tor?*
*So sieht es gute Ordnung vor!*
*Denn oben kommen Briefe rein,*
*und unten soll's für Zeitung sein.*



**Bildo 2** : Ruĝvosta birdo tuj ekkonas:
"Malhelan tubon mi bezonas!"
Allogis ĝin la verda stel´
enirornam´ ĉe l´ Saks-kastel´.


*Ein Gartenrotschwanz war dabei*
*zu suchen, wo gut wohnen sei.*
*Es lockte ihn der grüne Stern:*
*"In diesem Schlößchen wohn' ich gern!"*






**Bildo 3**: Pleniĝas nun la nigra tubo
per branĉoj, tigoj kaj lanugo:
Septagplektado – kaj la kesto
fariĝas firma birdonesto!

*Es füllt sich bald das dunkle Rohr,*
*mit Laub und Ästen geht man vor:*
*In Wochenarbeit zupft man fest*
*ein festgeflochtnes Vogelnest.*



**Bildo 4** : Leterpoŝtisto ne plu venis,
neniu nun kovadon ĝenis.
Jen la rezulton oni vidas:
kvar ruĝvostulbirdetoj ridas!

*Kein Postmann jetzt beim Brüten stört,*
*denn jeder weiß, was sich gehört:*
*So sieht man schließlich mit Vergnügen*
*vier Junge froh im Neste liegen!*

**Priaŭtora informo**

Bestkuracisto. Specialaj fakkampoj: medicina parazitologio kaj zoonozoj.

**Adreso de la aŭtoro**

*Prof. Dr. R. Sachs, Vor dem Brückentor 3, DE – 37269 Eschwege* / Germanio